Francilia federacio
KomitatKunsido (KK) 09/06/2023

Partopreno

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier (PG) vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France ĉeestas
- Marc Giraud (MG) prezidanto ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) vic-sekretario donas sian povon al LPI
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) sin ekskuzis
- Didier Loison (DL) kasisto ĉeestas
- Kévin Morel-Fourrier (KMF) donis sian povon al DJ
- Laure Patas d'Illiers (LPI) sekretario ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) vic-prezidanto ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) donis sian povon al MG

Ekde la antaŭa kunsido

18/03 okazis la Ĝenerala Asembleo, la protokolo estis aprobita kaj enretigita kun la aliaj dokumentoj de la ĜA al https://esperanto.paris/membro-kunvenoj Mankas la agadplano montrita dum la ĜA

24/03 okazis KomitatKunsido, la protokolo estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj

La kutimaj kursoj kaj agadoj regule okazis.

15/04, **prelego** de Svitlana pri la lingvoj en Ukrainio.

De 12/04 ĝis 29/05, okazis **ekspozicio pri Lucien Péraire**. Kvar paneloj en la stacidomo de Versailles-Chantiers, organizitaj de Pascal Dubourg-Glatigny, inter pluraj aliaj paneloj pri agadoj de CNRS. PG fotis.

De 25/05 ĝis 28/05, okazis la **foiro pri matematikaj ludoj** sur placo Saint-Sulpice. Deĵoris pluraj membroj: FLJ, AL, LPI, PG, Elisabeth Barbay, Régis Fournier, Melono, Lucien Bresler, Briac Millon. Grupoj de lernejanoj oficiale aliĝis al duonhora agado. La infanoj sekvis kurseton de Elisabeth pri nombrado kaj vortfarado. Multaj vizitantoj interesiĝis pri nia budo. Ni informis kaj disdonis kalendaretojn. La reagoj el la publiko estis tre bonaj.

03/06 okazis "**jardin des langues**" en publika biblioteko Marguerite Yourcenar. AK kaj LPI deĵoris. La etoso estis agrabla. Ni parolis kun kelkaj interesitoj, donis informojn, kalendaretojn. Iu interesiĝis pri MLA kiel agado en sia lernejo. Ni malkovris bonan Esperanto-parolanton: Paul, studenton en altlernejo pri fremdaj lingvoj INALCO, kiu intencas organizi kurson de Esperanto kadre de sia studenta asocio pri kreitaj lingvoj INALCEI (asso.inalcei@gmail.com) kaj kiu interesiĝas pri ludoj en Esperanto.

La biblioteko Marguerite Yourcenar enhavas "pôle des langues", tio estas parto dediĉita al lingvoj, kiu disponigas metodojn por lerni lingvojn kaj librojn en fremdaj lingvoj. LPI donis (persona donaco) la bildstrion "La pokalo de ĉiuj" al la respondeculo (Sandrine Chanteloup), kiu tre volonte akceptis ĝin nome de la biblioteko.

Nombro de niaj membroj

Porinforme, hodiaŭ 117 homoj estas aliĝintaj por la jaro 2022-2023. La aliĝperiodo iras de la 1a de oktobro ĝis la 30a de septembro.

Transpago de kotizo far Espéranto-France

Pri la sumo dispartigata al nia federacio kiam franciliano aliĝas al Espéranto France (vidu protokolon de la ĜA). Prizorgas PG

- Decido farita de la Komitato d'EF en sia kunsido de la 6/05/2023:
- Pri la kotizo de Francilio:
- "Augmentation du reversement, de 3,90 € à 5,90 €" pour le tarif plein et de 1,50 € à 2 € pour le tarif réduit,
- donc 10 % du montant de la cotisation.
- VOĈDONO: 0 kontraŭas – 3 sindetenas, adoptita

La afero estas kontentige solvita.

Asekuro de niaj eventoj

Espéranto-France ne pagas asekuron por la eventoj organizitaj de nia federacio, eĉ kiam ili okazas en la sidejo kaj kunigas membrojn de Espéranto-France. Tial ni bezonas trovi propran asekuron. MAIF petas 385€/jaro, kio ŝajnas multe. Indus kompari kun aliaj Eo-asocioj kiuj tiom agadas kiel la nia, ekzemple Marseille. Prizorgas DL.

Rilatoj kun niaj lokaj kluboj

Ekde la lasta KK, RC estas la reprezentanto de nia federacio ĉe la lokaj franciliaj kluboj. La celo estas kontakti la klubojn, ĝisdatigi nian retejon pri ili, informiĝi pri lokaj iniciatoj (asocioj, kursoj...) nekonataj, instigi neparizanojn al kreado de novaj grupoj eĉ ne formalaj, ktp.

RC kontaktis la grupojn listigitaj sur la retejo de la francilia federacio la 2-an de aprilo. Nur Choisy le Roi respondis ke ili redonos la sidejon al la urbodomo kaj serĉas helpon por translokiĝi. Bondy diris ke funkcis malmulte. Aliaj ne respondis. Novaj demandoj la 14-an de aprilo.

Aldone, estus bone havi interrilatojn kun la asocio INALCEI (v. supre). INALCO estas prestiĝa altlernejo pri fremdaj lingvoj. Gravas ke Eo estu konata de ĝiaj studentoj, apriore lingvemuloj. Ni povus helpi tiun asocion kaze de ekspozicio, prelego, ktp.

Plibonigi la retejon esperanto.paris

Pluraj plibonigoj estis planataj dum la lasta KK:

- Ĉe la hejmpaĝo, krei ligilojn al niaj kanaloj ĉe FB, Twitter, Mastodon, Telegram, Meet-up, ktp DJ kreis la ligilojn fine de la artikolo pri la asocio, kiu estas fine de la ĉefpaĝo. Por ke la ligiloj estu pli facile videblaj, oni proponas aldoni novan rubrikon kun nomo kiel "kontakto", kie estos la artikolo pri la asocio. DJ rigardos la aferon.
- Krei RSS fluon ankaŭ povas esti pristudita. Fakte jam ekzistas RSS ligilo fine de la paĝo.
- La kadro " Calendrier " (https://esperanto.paris/?departement=75) postulas unue elekti departementon, tiu etapo aperas senutila. Pli bonus kaj simplus meti ligilon al eventaservo kiel tiun : https://eventaservo.org/E%C5%ADropo/Francio/Parizo (kiu ankaŭ reklamas por aliaj parizaj kluboj) aŭ tiun https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris (nur pri ni). DL petis la 24/03/2023 Emmanuelle Richard ŝanĝi la titolon "Calendrier" al "L'espéranto près de chez vous" sed ŝi ne respondis.

Aŭtunaj eventoj por varbi

Ĉiujare ni partoprenas aŭ organizas eventojn por varbi novulojn, antaŭ la komenco de niaj eventoj kaj kursoj (unua semajno de oktobro).

Fête des associations de Paris Centre

La 1an sabaton de septembro, t.e. 02/09/23, tuttage de la 10a matene ĝis la 5a ptm kaj duono. Senpaga budo. Kiu prizorgas? LPI prizorgos la aliĝon. Eblaj deĵorantoj: DL, MP, PG, LPI.

Fête de l'Huma (Homarfesto)

De 15/09 ĝis 17/09. For de Parizo. Pagenda budo, proksimume 660€ TTC por 4m2, 1.260€ por 6 m2. Kiu pagos? Kiu prizorgas?

- Decido farita de la Komitato de EF dum sia kunsido de la 6/05/2023:
- 2.2 Budo en la Homara Festo 2023
- Budgété : 940 €
- Coût réel : 1260 € TTC
- Il faudra demander une participation de SAT-Amikaro.

ATENTU: AK petas, ke alia komitatano de Francilio planu kaj organizu la budon, sed pretas helpi.

Malfermataj pordoj

Dato fiksota, plej taŭga la 23/09, ni anoncos ĝin dum la homarfesto. Posttagmezo sufiĉas, de 14:00 ĝis 18:00. Eblaj deĵorantoj: PG, LPI, AL, RQ.

Estus bone prepari kaj anonci iun agadon, ekz ludo, prelego, kvizo, testo de nivelo… Niaj malfermataj pordoj povus senpage enkadriĝi en "Fête des possibles" https://fete-des-possibles.org/ por iĝi pli videblaj. Kiu prizorgas? DJ faros.

Salon Linguafest

De 29/09 ĝis 01/10. Organizota de Mundolingua. Okazos en la Halle des blancs manteaux. Laŭ informoj ricevitaj de AL kaj FLJ dum la salono pri matematikaj ludoj, ni povas ĝui senpagan budon. Urĝas aliĝi. DL kaj FLJ prizorgos la aliĝadon nome de Espéranto-France. DL organizos. Eblaj deĵorontoj: MP, PG

- Decido farita de la Komitato de EF dum sia kunsido de la 6/05/2023:
- 2.3 Linguafest (29 sept. / 1er oct. 2023)
- Coût : 1000 € TTC. Dons à venir (sera ajouté dans l'aliĝilo)

Lastminuta informo: konsiderinte la senpagecon de la evento, EF ne alvokos al donaco.

Salon de l'Éducation

Salon de l'Éducation (https://salon-education.com) 15→19 novembre 2023, Paris, porte de Versailles. La prezo de budo por asocioj estas 1.000€ ht (1.200€ ttc). Ne urĝas aĉeti la budon; EF povos fari tion kiam ni estos certaj ke estos deĵorantoj. Kiu prizorgas?

- Decido de la komitato de EF:
- 2.4 Budo en Salon de l'Éducation (nov 2023)
- Coût : 1200 € TTC
- Pour l'aliĝilo, ajouter les dons :
- ○ pour les calendriers
- ○ pour le salon de l'éducation
- ○ ~~don pour Linguafest (en collaboration avec francilio ?)~~
- Oni unue bezonas trovi organizanton.

Kursoj 2023-2024

Antaŭ la aŭtunaj eventoj, t.e. antaŭ la 02/09, necesos konfirmi kiujn kursojn ni proponos dum la jaro 2023-2024 por anonci ilin kaj varbi lernontojn. La nunaj estas:

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG continue
- cours intermédiaire en présentiel, lundi de 19h00 à 20h30, MP continue mais le cours passe à mercredi de 18h30 à 20h
- cours intermédiaire en ligne, vendredi de 18h00 à 19h30, MG continue
- cours supérieur en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ decidos en julio aŭ aŭgusto

Projektoj

- Revigligi la junularan Parizan movadon: AL deziras organizi retan kunsidon kun la junaj membroj pri ontaj agadoj. LPI sendos al AL la kontaktinformojn de ĉiuj junaj membroj.
- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn kaj disdoni librojn: MP (memorigoj: la protokolo de KK240323 enhavas multajn informoj pri tio, la biblioteko Marguerite Yourcenar povas esti bona enirpunkto vidu ĉi-supre)
- Subglasoj: GVN
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI
- Civitaj servistoj de Espéranto France: Espéranto France decidis ke ĝiaj civitaj servistoj dediĉos 6 horojn semajne al nia francilia federacio. Kion faros la civitaj servistoj dum la 6 horoj? Ili partoprenu kelkajn el niaj eventoj aŭ kursoj. Tial ni devos informi Espéranto France pri tiuj eventoj por ke Espéranto France enigu la eventojn en la laborkalendaron de siaj civitaj servistoj.

Vizitoj

- Korea familio (4 homoj) vizitos Parizon de 09/07 ĝis 14/07. Ĉu iu pretas ĉiĉeroni? MG, PG, MP (nur vespere)
- Ĉina Esperanto-Ligo trapasos Parizon 02/08 kaj denove 04/08. Ĉu iu pretas renkonti ilin?

Respondeculoj pri agadoj (rememoro)

La nunaj agadoj estas la jenaj. Dum la septembra KK, ni vidos ĉu ili plu daŭros dum la jaro 2023-2024

- Ĝemelurbo kun Romo: MG

- Legoklubo: MG neniu ekde la lasta KK
- Ludoj: AL kun Marielle Martin, probable ili ĉesos post la junia
- Ekzamenoj: FLJ
- Esperantokafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, okazos lunde
- Prelegturneoj: FLJ neniu okazas

Notu bone 1e: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2e: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

Respondeculoj pri informkanaloj (rememoro)

La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook MG DL MP https://www.facebook.com/esperanto.paris
- Twitter.com PG (AL) https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo MG AK DJ https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Meet-Up DJ https://www.meetup.com/fr-FR/Esperanto-Paris/

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 22/09/2023 je la 7a ptm kaj duono, mikse se eblas, se ne rete

FINO DE LA KK